

Karaj GI-legantoj, bonvolu senkulpigi min pro la "minaco" el 2007: "La redaktoro de GI adiaŭas". Mi tute ne esperis ĝisvivi la 11-an volumon aŭ resti almenaŭ en mensostato permesanta redakton ajnan. Sed oni estis persvadanta min tiom insiste, ke jen mi aŭdacis redaktore funkcii ankoraŭ ĉi-okaze.

Ĉu mi sukcesis, prijuĝu, konsiderante, ke la laboro prezentigis al mi ekstreme laciga. Sen la ĉiuspeca helpado fare de la ISAE-prezidanto, prof. *Sachs*, ĉio ĉi ne estus imagebla...

Memkomprene dankemo apartenas al la aŭtoroj.

Josef Kavka

Redaktanto de GI-11,
Honora membro de UEA, de ĈEA kaj de ISAE

D-ro *Kavka* adiaŭas – piloto forlasas la ŝipon resp. ties komand-
ejon. Krom multlabora epoko por ISAE kaj Scienca Revuo, li eldonis
en la jaro 1968 la unuan volumon de "GEOLOGIO INTERNACIA" kaj
redaktis nun, en 2010, ties 11-an volumon. Finas honorofica nepagata
okupiĝo kiel "motoro" de internacilingva fakgrupo. Tio ne estas
memkompreneblaĵo. Lia entuziasmo ankaŭ ne perdiĝis pro troaĝiĝo
kaj ŝrumpado de la membronombro, pro ĉiam pli malmulte da inte-
reso ĉe la junularo, kiu preskaŭ ekskluzive komunikas per interreto
kaj ne plu emas surpaperajn eldonojn. Malgraŭ ĉio tio, li neniam
perdis el la okuloj sian prioritatan celon, nome daŭrigi, kolekti kaj
formi sciencajn fakpublikigaĵojn.

Tio estis speciala trajto de la geologia sekcio, kies fieran GI-11 mi
havas la honoron prezenti al la legantoj de Scienca Revuo. *Kavka*
speciale atentigis pri la proprafaka terminaro. Krom siaj lingvaĵe ek-
zemplodonaj fakartikoloj en Scienca Revuo li ankaŭ aperigis speci-
alan faktermin-kolekton SR 1/2003 "Scienca Vortaro de Esperanto
(akompane al la nova PIV 2002)". Li same respondecas pri la aperigo
de SR 1/2009 "Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature
kaj terminologie", denove kontribue al PIV. Ambaŭ verkoj valoras
atenton ne nur ĉe legantoj de Scienca Revuo sed ankaŭ ĉe estontaj
fakaj sekcioj kadre de ISAE kaj ĉe la internacilingva sciencistaro.

Al la adiaŭanta aktivulo pri kaj por GEOLOGIO INTERNACIA *Josef*
Kavka mi deziras ĉion bonan kun plenkora danko pro la fruktodona
kunlaboro.

Prof. d-ro *Rüdiger Sachs*, prezidanto de ISAE

Ekivalent-norma konsisto de helaj mineraloj el la serio bazalta-fonolita

Josef KAVKA (CZ)

Enkonduko

Jam en 1986 mi traktis piroksenojn el la serio bazalta-fonolita.
Post la tro longa temp-intervalo mi venas al kompletigo, konsider-
ante nun feldspatojn kaj feldspatoidojn. Tiuj ja plej trafte bildigas
la serion. Do jen trakto sam-metoda, kia tiutempe, t.e. helpe de la
ekivalent-normo laŭ *P. Niggli*, ref. *C. BURRI* (1959). Unuavice
prezentiĝu dudeko da ĥemiaj analizoj (Tabelo 1), poste ties
Niggli-bazoj (Tabelo 2), fine la ekivalent-norma konsisto de la
koncernaj mineraloj. La lasta, Tabelo 3, estu iom komentata.

Feldspatoj

Pri la feldspatoj ĝenerale mi apogis min sur la monumenta
monografio plume de *J.V. SMITH* (1974). Speciale al la tipoj alt-
temperaturaj en la nordbohemia terciaro mi dediĉis atenton plur-
loke. En 1976 mi atentigis, ke bazi klasifikon sur feldspatoj foje
maleblas, ja proponis en 1972 la limon inter alkala bazalto (tefrito)
kaj fonolito difini helpe de kolorindico, t.e. sur procenta partopre-
no de la mineraloj malhelaj. Ja distingi inter kalcihava anortoklazo
unuafanke kaj kalihava oligoklazo aŭ andezino duaflanke, estus
enorme problemeca.

En 1985, kontestante ekziston de leŭcito en la nordbohemia
terciaro, denove mi revenis al la problemo de la feldspatoj alt-
temperaturaj.

Se oni observas la rezultan tabelon (Tab. 3), eblas dubi pri la no-
mo "anortoklazo" de *Auvergne* (n-ro 8): pro nesufiĉa komponanto
kalia (Or), la mineralo meritis nomiĝi pli eble albito! Plue, pri ve-
raj sanidinoj en la terciaro nordbohemia oni apenaŭ rajtas paroli:
tieaj fonolitoj estas tro natririĉaj, do ilia feldspato apartenas plej
ofte al anortoklazo.